

Vu-konsiletoj

[Forumo pri WooCommerce](#)

Enhavtabelo

Ligiloj al enesperantigoj

Terminoj

Glosaro de WooCommerce

Tipoj de varoj de WooCommerce

Rigardoj

Administrataj rigardoj

Klientaj rigardoj

Agordoj de varoj

Atributoj de varoj

Bildoj de varo

Videblecoj de varo

Mallonga priskribo de varo

Du iom komplikaj vartipoj

Varia varo - variaĵoj

Grupigitaj varoj

SKU

ID

Aspekto de la retejo

Ida etoso

Vendejo aŭ breto

Funkcioj de la retejo

Kromprogrametoj

Pagoservoj/Pagmetodoj

Pagoservoj jam en la kerno de WooCommerce:

Tajloreblaj pagoservoj de Booster por WooCommerce:

Sendometodoj

Sendmetodoj jam en la kerno de WooCommerce:

Sendmetodoj de ekspedaj servoj

Koncizkodoj

Products

add_to_cart

Kategorioj

Unuopa pago de varo

Rilataj varoj

Kelkaj koncizkodoj de Booster por WooCommerce

Utilaj trukoj

Aldoni al korbo per URL

RSS-Fluo

Restarigo de statoj

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

Propra traduko

Saŭco

Senda asekuro

Salutilo en menuo

Forigo de agnosko pri Storefront

Ida etoso de Storefront

Alia ida etoso

Ida etoso de Twentyseventeen

Tiparoj de Google

Montrofenestro



Ligiloj al enesperantigoj

WooCommerce: <https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce>

Oficialaj etosoj:

Storefront: <https://eo.wordpress.org/themes/storefront/>

Boutique: <https://eo.wordpress.org/themes/boutique/>

Deli: <https://eo.wordpress.org/themes/deli/>

Etendaĵoj por tiuj etosoj:

Glui la Aldoni al korbo (la butonon): <https://eo.wordpress.org/plugins/storefront-sticky-add-to-cart/>

Socia kunhavigo de varoj: <https://eo.wordpress.org/plugins/storefront-product-sharing/>

Pagoservoj:

Stripe: <https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce-gateway-stripe>

PayPal Express: <https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce-gateway-paypal-express-checkout>

Pliaj aldonaĵoj:

Booster por WooCommerce: <https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce-jetpack> (Pako de pluraj moduloj.)

WooCommerce PDF Invoices & Packing Slips (PDFaj Fakturoj kaj Pakoslipoj):

<https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce-pdf-invoices-packing-slips> Noto: PDFaj fakturoj kaj pakslipoj ankaŭ estas en la pako Booster por WooCommerce.

Waterwoo: <https://eo.wordpress.org/plugins/waterwoo-pdf> (Aldono de filigrano (akvomarko) al PDF-dokumento. Unu malbona efiko - ĝi senligas ligilojn.)

Langeto 'Korbo': <https://eo.wordpress.org/plugins/woocommerce-cart-tab/>



Terminoj

Glosaro de WooCommerce

(WordPress uzas oftajn vortojn. Fakaj vortoj estas foje elektitaj por koncizeco.)

wrapping DIV: grupiga DIV

price step: ŝtupo de prezo (ŝanĝero)

variable product: varia varo

variation: variaĵo (ekz. (mal-mez-grandaj ĉemizoj estas variaĵoj de la ĉefa varia varo)

affiliate: partnero

virtual, digital product: nefizika varo (neniu sendo estos fiksita por ĝi ĉe la korbo)

Bank Account Clearing System (BACS): BACS, elektronika ĝiro de banko, banka ĝiro

Cash on delivery (COD): kontanta mono je livero

acquisition source: fonto de vizito (la

maniero: https://en.wikipedia.org/wiki/HTTP_referer)

local pickup: loka preno

VAT: AVI (laŭ IKEV)

redemption code: apliko-kodo (de kupono)

reversal: malfaro

charge (al konto de aĉetinto): debeto

capture (charge): kapti (pagon)

authorize (charge): rajtigi (pagon)

pre-authorization: pendanta rajtigo

dispute: kontraŭo

release: liberigo

statement: etato

credit notes: kreditaj memorandoj

cross-sell: aldone reklami

upsell: promocie reklami

Geolocation: geolokado

line item: unulinia

live rates: realtempaj tarifoj

payment gateway: pagoservo

proforma: proforma antaŭfakturo

transient: nedaŭraĵo

crowdfunding: komuna financado

conversion, conversion rate: konvertiĝoj

tracking: spurado

multiplier: obligilo

nicename: urlnomo (por apero en URLoj, retadreso)

Special Drawing Rights: Speciala Rajto Ĉerpi (Artefarita valuto - Valuta kodo XDR aŭ SDR. En Vikipedio estas "Specialaj Rajtoj Enspezi". (mi malsamopinias))

flat rate: fiksa tarifo

endpoint: finadreso (por esti pli klara ol la traduko 'finpunkto')

opt-in: permespeto (Roĉjo)

raw: origina (la origina kurzo de valuto, antaŭ alĝustigo.)

drop shipper: ekstera ekspedisto

bank transit number: transita numero de banko

branch sort: filia ordo-kodo

currency: valuto (multe pli uzata ol 'monunuo' laŭ tekstaro.com)

Statoj de mendoj

back-order, backorder: pendanta mendo (Paul Peeraerts, UEA)

processing: pritraktanta, pritraktas

on hold: suspendita

complete: finfarita

pending: pritraktota (ankaŭ povas esti *malsukcesa*, finfine)

failed: malsukcesa, malsukcesis

refunded: repagita

cancelled: nuligita

Statoj de stoko

in stock: havebla

low stock: preskaŭ elĉerpita, baldaŭa elĉerpiteco

overstocked: trostokita, troa stoko

understocked: nesufiĉa stoko

out of stock: elĉerpita

Tipoj de varoj de WooCommerce

- *Simpla*: neniuj opcioj. Ekzemple, libro.
- *Grupigitaj*: rilataj simplaj varoj. Ili povas esti aĉetitaj unuope. Ekzemple, servico de 6 tasoj.
- *Nefizika*: ne devas esti fizike sendita/ekspedita. Ekzemple, servo. Elekto de tia varo malebligas ĉiujn sendajn opciojn. Ankaŭ, kliento ne vidus sendan kalkulilon en la korbo/pagprocezo.
- *Elŝutebla*: Elekto de tio aperigas aldonajn kampojn kie la administranto povas enigi elŝuteblan dosieron. Post aĉeto, kliento ricevas elŝutan ligilon, ankaŭ en la mendokonfirman retmesaĝon. Ekzemploj: PDF, muziko, foto.
- *Ekstera/partnera*: varo listigita ĉe la vendejo, sed fakte vendita aliloke.
- *Varia*: varo kun variaĵoj. Ĉiu variaĵo povas havi apartan SKU-on, prezon, ktp. Ekzemple, ĉemizo havebla en pluraj koloroj.



Rigardoj

Administrataj rigardoj

Kiam vi alklakas al WooCommerce en la administra panelo de WordPress, tuj rigardu al la supro. Ĉu vi vidas langeton *Ekranaj agordoj*? Alklaku kaj marku ĉiujn skatolojn, por ricevi plenan administran tabelon.

Se vi uzas Booster por WooCommerce, iru al Agordoj de Booster, trovu kaj ebligu la modulon *Administra breto en Retpoŝto k. divers.* Vi ricevos novan breton je la supro de la administra panelo de WordPress.

Poste, ĝisu vian familion. Vi estos perdita dum jaroj en amaso da ebloj kaj ecoj de Booster.

En la **administra listo de varoj** de WooCommerce, vi povas:

- Elstarigi varon per alklako al la stelo. Tio ankaŭ eblas en la Rapidredaktilo. Post elstarigo, vi povas montri ilin per la kromprogrameto Varoj, aŭ, se vi volas uzi tiun kromprogrameton por alia montrado, vi povas enmeti la koncizkodon `[products visibility="featured"]` en paĝon aŭ afiŝon, por aldoni al via menuo. La opcio en tiu koncizkodo kiu elektas montri la elstarigitajn varojn estas `visibility="featured"`. [Koncizkodoj](#)
- Vidi varojn laŭ statoj de stoko: Havebla, Elĉerpita, Mendo pendas.
- Vidi varojn laŭ tipo de varo: Simpla, Varia kaj Elŝutebla kaj Nefizika (povus esti servo).
- Vidi varojn laŭ kategorio.
- Redakti aŭ rapide redakti varon.
- Krei duplikaton (kopion) de varo. Tio utilas, kiam vi volas krei saman tipon de varo kun samaj dimensioj kaj/aŭ atributo...

- Trovi la IDon de varo. Estas videbla je ŝvebo de la muso.

En la **administra listo de mendoj**, vi povas:

- Redakti mendojn.
 - Depende de la instalitaj etendaĵoj/kromprogramoj, verki noton, sendi retmesaĝon, vidi aliajn mendojn de tiu kliento, krei fakturon, krei pakoslipon.
 - Ŝanĝi la staton de tiu mendo aŭ eĉ enrubigi ĝin.
- Aldoni novan mendon permane.
- Montri mendojn de aparta kliento, per filtrilo.
- Apliki agon al pluraj mendoj samtempe, per Agoj amase. Sed faru tion tre zorgeme.

En la **administraj raportoj** de WooCommerce, vi povas:

Mendoj:

- Vidi vendojn laŭ dato.
- Vidi vendojn laŭ varo.
- Vidi vendojn laŭ kategorio.
- Vidi uzon de kuponoj.
- Vidi elŝutojn, la tempon de elŝuto kaj la IP-adreson de la aparato uzita por elŝuti.
 - Vi povas filtri la rigardojn de tiuj elŝutoj.
- Eksporti la vendojn por malfermi la komo-apartigitan dosieron kiel kalkultabelon.

Klientoj:

- Kompari la aĉetojn de registritaj klientoj kontraŭ tiuj de gastoj.
- Iri redakti la profilojn de la registritaj.
- Ligi la antaŭajn mendojn de aparta kliento, por kunigi ilin.

Stoko:

- Kontrolu baldaŭan elĉerpitecon de iu varo – grave.
- Vi povas vidi, ĉu stoko de varo estas tute elĉerpita.
- Vi povas vidi la varojn kun la plej multaj restantaj ekzempleroj.
- De tie, vi povas redakti varojn kaj vi povas rigardi ilin en la unuopa paĝo de varo.

Impostoj:

- Vidi impostojn laŭ kodo.
- Vidi impostojn laŭ dato.

Konsileto: por kunhavigi 'raporton' kun la grafikaĵoj de vendoj, maletendu la flankan administran panelon de WordPress, premu F11 se vi uzas ordinaran klavaron, por plenekrana rigardo, kaj kaptu ekrankopion. Vi povas enmeti tiun ekrankopion en raporton por montri al aliaj.

Klientaj rigardoj

Mia Konto

Grava loko estas Mia Konto. Mia Konto estas paĝaro por ensalutintaj klientoj. De tie, klientoj povas alklake vidi detalojn pri mendoj, aliri al elŝuteblaj varoj, ŝanĝi adreson kaj pasvorton.

Aldonaj etendaĵoj kaj kromprogramoj povas enmeti pliajn aferojn en Mian Konton, por doni al klientoj alireblon.

Aldono al menuo gravas, ĉar Mia Konto donas tiom da utilo al klientoj.
Noto: se gastoj rajtas aĉeti varojn, tio signifas, ke registritaj klientoj

Jen, ekrankopio de Mia Konto, ĉe la mendoj:

MENDOJ

- Panelo
- Mendoj
- Elŝutaĵoj
- Adresoj
- Konto-detaloj
- Elsaluti

Mendo	Dato	Stato	Fina sumo	Agoj
#723	7 Marto 2018	Suspendita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)
#716	7 Marto 2018	Suspendita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)
#714	7 Marto 2018	Finfarita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)
#713	7 Marto 2018	Finfarita	\$30.00 por 6 eroj	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)
#705	6 Marto 2018	Nuligita	\$25.00 por 3 eroj	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)

Teste, mi provis aldoni eblon al kliento nuligi mendon, kun aldona klarigo, pere de kromprogramo Booster por WooCommerce. (En *Agordoj* de Booster por WooCommerce → *Retpoŝto k. Divers.* → *Mia Konto.*) Jen, la aspekto post alklako al 'Nuligita' ĉe mia plej supra mendo:

MENDOJ

- Panelo
- Mendoj
- Elŝutaĵoj
- Adresoj
- Konto-detaloj
- Elsaluti

Por nuligi vian mendon, vi rajtas alklaki al **"Nuligita"** por fakte ŝanĝi la staton al Nuligita.

Mendo	Dato	Stato	Fina sumo	Agoj
#723	7 Marto 2018	Nuligita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)
#716	7 Marto 2018	Suspendita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Nuligita Elŝuti fakturon (PDF)
#714	7 Marto 2018	Finfarita	\$5.00 por 1 ero	Vidi Nuligita Elŝuti fakturon (PDF)
#713	7 Marto 2018	Finfarita	\$30.00 por 6 eroj	Vidi Nuligita Elŝuti fakturon (PDF)
#705	6 Marto 2018	Nuligita	\$25.00 por 3 eroj	Vidi Elŝuti fakturon (PDF)

Vi povas vidi, ke la vorto 'Nuligita' estas aldonita al la sekcio Agoj de ĉia mendo escepte jam nuligitaj mendoj. Mi vidas neniun manieron ŝanĝi la vorton videblan al la kliento. Mi vidas neniun manieron aldoni limdaton por tiu ago. Mi vidas neniun manieron limigi ĝin al nur mendoj pritraktataj.

La mendo kiun mi nuligis ja estis nuligita en la administrado de mendoj, sed mi ne vidas alĝustigon al la nombro da tiu varo en stoko. Tio estas la plej grava manko. La nombro en stoko devus resti

ĝusta. Booster bezonas ellabori tiun econ. Baf!

Menuo

Ne forgesu, ke via menuo estas grava rigardo por vizitantoj. Kiam vizitanto ne povas rapide trovi lokon en via vendejo, tiu vizitanto rapide foriras.

Menueroj kaj submenueroj por la vendejo-paĝo, la paĝo Mia Konto kaj eble la korbo-paĝo estas bonaj ideoj. Vi povas ankaŭ enmeti menuerojn por varkategorioj, etiketoj de varoj, individuaj varoj kaj 'WooCommerce-finadreso' (la apartaj paĝoj de Mia Konto). La elsalutilon en WooCommerce-finadreso vi povas aldoni al la ĉefa menuo, por rapida, senĝena trovo.



Agordoj de varoj

Atributoj de varoj

Ĉu vi volas profiti de atributoj? Por difini atributojn por la tuta vendejo, iru al *Varoj* → *Atributoj*.

Aldonu novan atributon. Aldonu nomon por la atributo, ekz. Grando. Por urlnomo, donu la nomon sen ĉapelitaj literoj. Poste, alklaku *Agordi terminojn* kaj aldonu la nomojn de ĉiuj grandoj.

Poste, vi devas iri al ĉiu varo por aldoni tiun atributon, per *Atributoj* en la redaktopaĝo. Post aldono de la atributo, en la skatolon *Valoro(j)*, vi devas alklaki por vidigi la valorojn – elektu laŭvole.

Konservu la atributojn.

Vi povas uzi nun la kromprogrameton *Filtri laŭ atributo*, por permesi al vizitantoj la eblon traserĉi viajn varojn laŭ kvalitoj. Ekzemple, se tre granda persono vizitas por vidi ĉu vi ofertas tre grandajn vestaĵojn, li/ŝi povas uzi tiun kromprogrameton por elekti vidi varojn tre grandajn.

Alia uzo estas en koncizkodoj.

Alia eblo aldoni atributojn estas je la nivelo de individua varo, per *Propra vara atributo*. Tiaj atributoj ne estas haveblaj en navigado nek en kromprogrametoj.

Bildoj de varo

La ĉefa bildo de varo estas *Varo-bildo*. La panelo por aldoni bildojn estas en la redaktopaĝo de varo.

La rekomendo de dimensioj por bildo estas 800 x 800 bilderoj.

En la vara galerio, vi povas aldoni pliajn bildojn de la varo, laŭplaĉe. Se vi vendas libron, vi povas foti paĝojn kaj enmeti tiujn bildojn de kelkaj paĝoj, por tenti vizitantojn per antaŭlego.

Videblecoj de varo

Je aldono de nova varo, aŭ redakto, vi povas fiksi videblecon de la varo, en *Videbleco en katalogo*, en la publikiga panelo de la redaktopaĝo. Vi ankaŭ povas marki skatolon por elstarigi tiun varon.

- Vendejo kaj serĉrezultoj – videbla ĉie.
- Nur vendejo – videbla en la vendejo kaj en paĝoj de kategorioj.

- Nur serĉrezultoj – videbla nur en serĉrezultoj, ne en la vendejo, ne en kategori-paĝoj.
- Kaŝita – estos videbla nur en la unuopa paĝo de varo.
- Ĉi tiu estas elstarigita varo – suba markskatolo, por uzo en altiro de aparta atento al tiu varo.

Mallonga priskribo de varo

La mallonga priskribo verkita en la redaktopaĝo kutime aperas apud la bildoj de la varo en la rigardo de varo ĉe la fasado. Al la mallonga priskribo, vi povas aldoni filmeton, se vi volas. La longa priskribo aperas en la langeto Priskribo.

Du iom komplikaj vartipoj

Varia varo - variaĵoj

Vi volas krei variaĵojn de varo. Ni diru, ke via varo estas ĉemizo. Iru al Varoj → Aldoni novan. Iru al la skatolo *Vardatumoj*. Elektu '*Varia varo*'. Iru al '*Atributoj*'. Apud la vortoj '*Propra vara atributo*' alklaku la butonon '*Aldoni*' aŭ elektu el jam aldonitaj atributoj. Entajpu nomon, eble Grando, se temas pri etaj, mezgrandaj kaj grandaj ĉemizoj. En la skatolo *Valoro(j)*, vi povas entajpi Malgranda | Mezgranda | Granda. Jes, apartigu valorojn per tiu vertikala strio.

Alklaku '*Konservi atributojn*'.

Iru al '*Variaĵoj*'. Elektu krei variaĵojn el kombinoj de tiuj atributoj, ĉar vi jam aldonis la bezonatajn informojn.

Ŝvebigu la muson super ĉiu variaĵo kaj vidu la sagon aperi apud ĉiu (kun movilo kaj eblo forigi la variaĵon). Alklaku la sagon kaj vi povas ebligi stokadon de tiu variaĵo, doni ekzemplerojn en stoko, malsaman SKU-on al tiu variaĵo, bildon de tiu variaĵo, ktp.

Memoru konservi viajn ŝanĝojn post ĉiu paŝo.

Ho, kaj dum vi estas en Variaĵoj, vi povas elekti defaŭltan variaĵon. Tiu estos ŝargita kaj vidita kiam kliento vizitas tiun varon. Tiu eblo estas ĉe '*Defaŭltaj valoroj por formularo:*' Se vi ne elektas defaŭltan, la vara bildo aperos (alŝutu varan bildon! - tiu skatolo troviĝas al la dekstro) kaj la falmenuo diros '*Elekti opcion*'.

Grupigitaj varoj

Por krei aron de varoj, vi devus unue krei la grupon. Por krei la grupon, kiu estas nur ujo, vi kreas novan 'varon'! Donu titolon por la grupo kaj en *Vardatumoj*, elektu tipon Grupigita varo. Vi rimarkos, ke la prezo kaj kelkaj aliaj kampoj malaperis. Tio okazis, ĉar vi kreas grupon, intencitan enteni varojn. Publikigu vian grupon. Nun, vi povas vidi novan econ en *Ligitaj varoj*. Grupigitaj varoj! En tiun lokon, vi povas jam aldoni ekzistantajn varojn al tiu grupo. Se vi bezonas krei novajn varojn por tiu grupo, vi devos reveni poste al tiu 'grupigita varo', iri al *Ligitaj varoj* → *Grupigitaj varoj* kaj aldoni ilin. Post alklako al Ĝisdatigi, tiu grupo aperos en via vendejo.

SKU

Stoko-Kod-Numero

Aŭtomata numerado de SKU-oj

Se allogas vin la eblo aŭtomatigi var-numeradon de SKUoj, per Booster por WooCommerce, konatiĝu kun la ŝablono.

Ŝablono de SKU-numero: `{category_prefix}{prefix}{sku_number}{suffix}{category_suffix}{variation_suffix}` =
prefikso de kategorio + prefikso + cifera parto de SKU + sufikso + kategoria sufikso + sufikso de variaĵo.

Se vi ofertas multajn simplajn varojn, la senpaga versio funkcias bone.

Se vi havas vendejon *Vestaĵoj Por Vi* kaj ofertas sportĉemizon (en kategorio *Sporto*) en 3 versioj: malgranda, mezgranda kaj granda, kaj vi volas malsamajn SKUojn por ĉiuj grandoj.....

Vi decidis uzi ĝeneralan prefikson por SKUoj kiu estas mallongigo de via vendejo: **VPV**. Vi pensas, ke vi ne uzos ĝeneralan sufikson. Vi decidis ekspluati la fakton, ke aldono de kategoria sufikso estas senpaga, do vi entajpas sufikson **SPO** por la kategorio *Sporto*.

Vi malkovras, ke "Variaĵoj de variaj varoj" havas opcion nur "SKU same kiel patra varo" en la senpaga versio.

Vi malridetas, ĉar vi vere volis havi malsamajn SKUojn por ĉiu granda de tiu ĉemizo.

La SKU devos esti simila al: **VPV1SPO** por ĉiu granda de via sportĉemizo!

Sed iru al viaj variaĵoj en tiu 'afiŝo' de varo kaj permane donu la deziratajn SKUojn al ĉiu variaĵo.

Ĉiaokaze, ĉiu variaĵo ricevas unikan ID-on.

Do, vi devis doni SKUon por la variaĵoj permane en la senpaga versio.

ID

ID de varo estas trovebla en la administra listo de varoj, per ŝvebigo de la muso super la varo.

Rimarku, ke ĝi estas la afiŝa ID de tiu varo.

ID de variaĵo estas trovebla apud ĉiu variaĵo en la redaktopaĝo de la varo. Ĝi havos kradon antaŭ ĝi.

Ekz: #1234.

Unu uzo de la ID estas aldoni ĝin al URL por ke homoj povu aldoni tiun varon al la korbo simple per alklako al tiu URL. <https://viavendejo.com/korbo/?add-to-cart=757>



Aspekto de la retejo

Ĉu vi scias ke la oficiala etoso de WooCommerce, Storefront, havas du idajn etosojn? [Deli](#) kaj [Boutique](#). Boutique, malfeliĉe, uzas tiparon *Lato* kiu ne enhavas la ĉapelitajn literojn. Vi povas iri al sekcio Saŭco [Tiparoj de Google](#) por legi pri anstataŭigo de *Lato*.

En *Aspekto* → *Storefront* vi povas trovi ankaŭ tri etajn etendaĵojn, Glui la Aldoni al korbo (la

butonon), la Langeton 'Korbo' kaj Socian kunhavigon de varoj. Ili estas en Esperanto.

Se vi ankoraŭ ne iris al la Tajlorilo rilate WooCommerce:

Aspekto → *Tajlori* → *WooCommerce*

kaj en la Tajlorilo ankaŭ, iru al → *Agordoj de ĉefpaĝo*. Se vi montras fiksan paĝon en la ĉefpaĝo, specife la paĝon Bonvenon, via ĉefpaĝo iĝos bela vendejo – nu, katalogo! Sed se vi elektas alian, vi povas aldoni la vendejan paĝon al la menuo kaj laŭplaĉe kelkajn kromprogrametojn al la flankpanelo kaj/aŭ piedo kaj/aŭ supro (sub kapo).

Vi povas uzi aliajn etosojn, sed zorge testu por vidi ĉu ĉiuj funkcioj de la vendejo okazas glate. Se vi ricevas mesaĝon, ke via etoso ne subtenas WooCommerce, tuj [serĉu pli taŭgan](#). Provu la oficialajn etosojn de WordPress, kiuj komenciĝas per Twenty-

Ida etoso

Se vi faras ŝanĝojn al etoso, tiuj ŝanĝoj perdiĝos post la sekva ĝisdatigo de tiu etoso. Por konservi viajn ŝanĝojn, vi devus krei kaj uzi idan etoson. Ida etoso povas enhavi nur viajn ŝanĝojn.

WordPress prenos ĉion alian de la patra etoso.

Storefront estas la oficiala, fidinda etoso de WooCommerce. Legu pri kreo de ido de *Storefront* en [Ida etoso de Storefront](#).

Vendejo aŭ breto

Eble vi volas, ke via tuta retejo estu vendejo. Tiaokaze, havas sencon ebligi fiksan paĝon por la ĉefpaĝo. Vi povas facile fari tion en la Tajlorilo. Iru al *Aspekto* → *Tajlori* → *Agordoj de ĉefpaĝo*. La paĝo Bonvenon estas celita kiel la defaŭlta paĝo. Vi povas elekti alian paĝon aŭ proprigi la paĝon Bonvenon.

Eble vi volas nur 'breton' de varoj en via retejo. Tiaokaze, vi povas uzi iun paĝon kiel fiksan paĝon por la ĉefpaĝo, kiu ne mencias varojn. Alternative, vi povus elekti montri blogon sur la ĉefpaĝo. En via menuo, vi volas enmeti la vendejo-paĝon de WooCommerce. Vi havas elekton montri kromprogrameto(j)n de la vendejo kaj povas videbligi ilin en ĉiuj paĝoj aŭ nur en elektitaj paĝoj. Vidu la opciojn de *videbleco* dum vi agordas kromprogrameton.

WooCommerce enmetas kelkajn paĝojn en vian vendejon je aktivigo. Tio estas por helpi vin starigi vendejon. Kiam vi iras redakti tiujn paĝojn, foje vi vidas kodon, foje vi vidas nenion. Sed WooCommerce programas enhavon por la paĝoj, eĉ kiam ili aspektas malplenaj! Ene de la paĝoj, vi povas enmeti tekston kaj/aŭ koncizkodon. Via kontribuo aperos en la supro de la paĝo, se la paĝo aspektas malplena. WooCommerce enmetos kodon sube.

Se vi vidas kodon en la paĝo, vi kompreneble havas eblon enmeti ion post tiu kodo kaj tiu kontribuo aperos sube de la kodo de WooCommerce.

Vi rajtas alinomi la paĝojn! Nur kontrolu en la agordoj de WooCommerce, ke la paĝoj kun viaj nomoj estas elektitaj kiel la uzataj paĝoj, sub langetoj *Varoj*, *Pagprocezo* kaj *Kontoj*.



Funkcioj de la retejo

Kromprogrametoj

En *Aspekto* → *Kromprogrametoj*.

Kromprogrametoj helpas vizitantojn trovi kion ili serĉas aŭ rapide vidi informojn. Kutime, vi povas aldoni la saman kromprogrameton plurfoje al loko.

Kromprogrametoj de WooCommerce

- Aktivaj varo-filtriloj
- Filtri varojn laŭ atributo
- Filtri varojn laŭ prezo
- Filtri varojn laŭ taksado
- Kategorioj de varoj
- Varoj
- Varoj laŭ pritakso
- Varserĉo
- Nub-etikedo de varo
- Lastaj pritaksoj de varoj
- Laste rigardataj varoj

Varoj: Per la kromprogrameto *Varoj* de WooCommerce vi povas montri varojn laŭ: *dato*, *prezo*, *vendoj* aŭ nur *hazarda* elekto.

Se vi lasas ĝin je *dato*, malkreska ordo (MALKRESK), la kromprogrameto montros la plej novajn varojn. Do, la titolo povus esti -Novaj varoj-.

Se vi elektas montri varojn laŭ *prezo*, kaj ŝanĝas ordon al kreska (KRESK), vi povas montri la plej malmultekostajn varojn. Eble vi volas ŝanĝi la titolon al -Nekredindaj prezoj-. Por montri laŭ *vendoj*, elektu tiun kaj ordigu laŭ MALKRESK por montri plej vendatajn. Por kromprogrameto kiu ŝanĝas montron de varoj laŭ neniu specifo, elektu la ordigon *Hazarda*.

Videbleco estas tre interesa opcio por kromprogrametoj. Alklaku al tiu. Vi povas elekti montri aŭ kaŝi la kromprogrameton ĉe elektitaj paĝoj, kategorioj, al elektitaj uzantoj, ktp, ktp. Vi rajtas aldoni pliajn videblecojn ĝis vi montras/kaŝas la kromprogrameton ĉe ĉiu paĝo aŭ uzanto ktp. dezirita. Notu, ke kelkaj kromprogrametoj de WooCommerce estas programitaj aperi nur ĉe la vendejaj paĝoj, ekz. *Filtri laŭ atributo*.

Filtri laŭ atributo: Per la kromprogrameto *Filtri laŭ atributo*, vizitantoj povas rapide vidi, ĉu via vendejo havas tion, kion ili bezonas. Notu, ke vi devas enmeti atributojn per *Varoj* → *Atributoj*. En la agordo de la kromprogrameto, elekto de KAJ en *Tipo de peto* signifas, ke ĉiu elektita atributo devas esti plenumita de varo por ke ĝi aperu en la serĉrezultoj. Elekto de AŬ signifas, ke se vizitanto elektas plurajn atributojn, la serĉrezultoj rajtas montri ĉiujn varojn kiuj rilatas al almenaŭ unu el tiuj atributoj.

Notu, ke vi rajtas aldoni plurajn filtrilojn laŭ atributo. Vi ne devas esti limigita al nur unu filtrilo.

Pagoservoj/Pagmetodoj

Pagoservoj jam en la kerno de WooCommerce:

- PayPal Normala
- Ĉeko
- BACS (rekta banka ĝiro)
- Kontanta mono je livero
- Stripe
- PayPal povigita de Braintree
- Klarna

Senpage aldoneblaj:

- Square
- Rapida pago de PayPal
- PayPal Altnivela
- PayPal Plus
- PayFast
- eWay
- Postgiro/Bankgiro
- IcePay
- Novalnet
- Amazon Pay
- FuturePay
- Propoza

Tajloreblaj pagoservoj de Booster por WooCommerce:

Eble vi volas, ke membroj de kooperativo povu pagi per siaj kontoj. Vi povas aldoni propran pagoservon kun eniga kampo ĉe la pagproceza paĝo por permesi entajpon de konto-numero. Instaluu Booster por WooCommerce. En *Agordoj de Booster* → *Pagoservoj*, marku la skatolon *Aldoneblaj pagoservoj*. Konservu la ŝanĝon. En la agordoj por tiu modulo, aldonu vian nomon por via pagoservo. Konservu.

Post tio, alklaku al la langeto *Pagprocezo* de WooCommerce. Rulumu suben ĝis vi vidas la nomon de via pagoservo, en *Aranĝo de mendo por pagoservo*. Alklaku la nomon kaj marku la skatolon por ebligi pagon. Donu titolon, kiu aperos ĉe tiu pagomaniero. Sub la titolo, donu priskribon kaj enigan kampon en tiu priskribo, en kiu kliento povas tajpi kontonumeron. Se la kontnumero estas litercifera (enhavas literojn kaj eble ciferojn), uzu: `Por pagi per konto ĉe Nomo de Organizaĵo, entajpu vian kontonumeron: [wcj_input_field name="Kontnumero" type="text"]`. Se la kontnumero enhavas nur ciferojn, vi povas uzi: `Por pagi per konto ĉe Nomo de Organizaĵo, entajpu vian kontonumeron: [wcj_input_field name="Kontnumero" type="number"]`.

Vidu, la diferenco inter la du koncizkodoj estas la tipo de enigo (type=" "). La eblaj tipoj de enigo por tiu koncizkodo de Booster estas:

- `Text` – teksto. Teksto estas la defaŭlto; eĉ ne estas deviga!
- `Number` – cifera.
- `Password` – pasvorto.
- `Date` – dato.
- `Month` – monato.
- `Week` – semajno.
- `Time` – horo.
- `Datetime-local` – loka horo.
- `Email` – retpoŝtadreso.
- `Color` – koloro.
- `Range` – gamo.
- `Tel` – telefonnumero.
- `Url` – URL.

`name=" "` en la koncizkodo estas deviga. Name estas la angla vorto por nomo.

Cetere, se vi intencas uzi tiun koncizkodon en alia loko – ĝi ja estas utila – vi eble volos enmeti nedevidigan `label=" "`. Label estas la angla vorto por etikedo. Do, se vi volas doni etikedon inter la citiloj por nomi tiun uzon de la koncizkodo, bone. Por eniga teksto-kampo, vi havus koncizkodon: `[wcj_input_field name="Kontnumero" label="miapagoservo"]`.

Sekve, donu la instrukciojn por la dankpaĝo (*Dankon! Ni debetos vian konton ĉe Nomo de Organizaĵo.*) kaj por la retmesaĝo, por klarigi al uzantoj. (Ŝvebigu la muson super la demandosignoj por ricevi viajn proprajn instrukciojn, ĉar malgraŭ ke mi tradukis ĉion, angla ankoraŭ aperas.) La piktogramo de via servo povas esti proksimume 40x25 bilderoj (pikseloj, rastrumeroj, laŭ via vortprefero).

Se vi volas uzi specialan dankopaĝon por uzantoj de tiu pagomaniero, vi povas krei la paĝon kaj entajpu la URLon al ĝi en *Propra direkta URL (Dankopaĝo)*. Ili estos direktitaj al ĝi post pago.

Konservu viajn ŝanĝojn. Nun, vi devus provi ĝin, por vidi ĉu la priskriboj kaj instrukcioj estu pli klaraj. Iru al la administrado de mendoj, por vidi viajn testajn mendojn, kaj rigardu en la kolumno *Fakturado* por via pagmaniero. Se vi ne programas aŭtomatan debetadon, vi devos permane alklaki al tiuj mendoj por legi la kontnumeron registritan de la eniga kampo kaj iri kapti la monon. Post ĝiro, vi povas permane ŝanĝi la staton de la mendo al Finfarita kaj alklake sendi retmesaĝon kaj eble PDFan fakturon al la kliento.

Se via vendejo estas eta, tiu permana traktado eble ne estas tro temporaba.

Sendometodoj

Sendmetodoj jam en la kerno de WooCommerce:

- Fikstarifa

- Senpaga
- Loka preno
- Malnova – Sendozonoj anstataŭis ĝin

Ebligu sendon en la ĝeneralaj opcioj de WooCommerce.

Per sendozonoj, vi rajtas agordi malsamajn sendokostojn por malsamaj regionoj de la mondo.

Bonvole zorge elektu regionojn por ĉiu nomo de sendozono. Tiuj difinas la lokojn.

Neniu regiono por sendozono sendas al ĉiu mondoparto.

Viaj sendozonoj estas kontrolitaj por kongruo kun adreso de kliento laŭ la ordo en kiu vi aranĝas ilin, de la supro malsupren. Do, se klienta adreso okaze estas en du sendozonoj, la sendmetodo(j) de la unua sendozono en via listo estos montrita(j) al tiu kliento.

Fikstarifa

La sendmetodo Fikstarifa estas pli ol tio! En la agordoj de fiksa tarifo por individua zono, vi povas difini sendokoston en la kampo *Kosto* aŭ vi povas elekti uzi sendokategoriojn. La kampo *Kosto* povas esti vere fikstarifa. Sed la ignoro de tiu kampo kaj anstataŭa aldono de sendkategorioj kaj kostoj por la sendkategorioj donas multajn pliajn eblojn.

Vi povas enigi fiksan kvanton aŭ vi povas enigi koncizkodojn por pagigi pli se pliaj eroj estas en la korbo, ktp. Lasu min montri du ekzemplojn rekte el la dokumentado de WooCommerce:

1. $10 + (2 * [qty])$ – baza sendokosto de 10 (en la elektita valuto) plus 2 por ĉiu ero en la korbo.
2. $20 + [fee\ percent="10" min_fee="4"]$ – baza sendokosto de 20 plus 10% de la tuta kosto de la mendo, sed tiu aldona tarifo devas esti almenaŭ 4 (alivorte, se la elcentaĵo estas malpli ol 4, aldonu 4 al 20).

Pri tiuj koncizkodoj:

[*qty*] estas mallongigo de kvanto.

[*fee*] estas la angla vorto por tarifo kaj tiu koncizkodo povas havi du opciojn:

- *percent* – elcento de la tuta kosto de la mendo.
- *min_fee* – minimumo por tarifo. Ĝi estas utila kun uzo de elcentaĵo.
- (tamen, mi tradukis linion pri fikstarifa sendo kun *max_fee*. Do, devas esti maksimuma tarifo fiksebla.)

Se vi volas pagigi pli por pezaj eroj, vi povas difini novan sendkategorion *Peza*.

Se vi difinas kostojn laŭ sendokategorioj, ankaŭ plenigu tiun kampon por kosto kun *neniu* sendkategorio.

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

En la redaktopaĝoj de la varoj, vi rajtas elekti difinitan sendkategorion por ĉiu varo. Se vi ne elektas kategorion por la varo, la specifita kosto kun neniuj sendkategorioj estos aplikita aŭ – se vi plenigis la kampon *Kosto*, tiu kosto estos aplikita ankaŭ.

La *Tipo de kalkulo* influos la tutan koston de mendo kun pluraj eroj. La opcioj estas: *Por ĉiu kategorio: postuli sendokoston por ĉiu aparta sendkategorio*. Tiu tipo kalkulas kaj sumigas la sendokostojn por varoj en mendo kun eventuale malsamaj sendkategorioj. Ĝi estas pli fajna kalkulo. *Por ĉiu mendo: postuli sendokoston por la plej multekosta sendkategorio*. Por mendo de pluraj eroj, tiu tipo bazas la sendokoston sur la plej multekosta sendkategorio el la tuto.

Noto: se vi enigis koston en la kampo *Kosto* kaj post tio, vi ankaŭ enigis kostojn por sendkategorioj, ĉiuj tiuj sendokostoj povas esti aplikitaj al varoj!

Aldonaj sendmetodoj

Al viaj sendozonoj, vi povas aldoni opciajn sendmetodojn per uzo de la sendmetodo *Fiksa Tarifo*. Kreu novan fiksan tarifon. Alinomu ĝin kaj enmetu en ĝi la deziratajn tarifojn. Ekzemple:

Se vi volas ebligi opcion rapida sendo (ekspreso), vi povas difini novan sendometodon por tiu. Ĝi devus esti aldona elekto por la kliento, do en ĉiu sendozono en kiu vi volas oferti rapidan sendon, aldonu novan sendometodon *Fiksa Tarifo*. Redaktu ĝin kaj **alinomu** ĝin *Rapida*. Enigu la koston. Ne forgesu, se vi kreis sendokategorion por pezaj varoj, enigu koston en tiu kampo. Konservu viajn ŝanĝojn. Nun viaj klientoj en tiuj sendozonoj vidos tiun sendan opcion kaj rajtos elekti ĝin. Vi vidos tiun elekton de sendometodo en la administrejo, ankaŭ.

Senpaga

En la sendmetodo *Senpaga* kiu venas kun WooCommerce, vi povas doni senpagan sendon al klientoj se la mendo atingas specifitan kvanton da aĉeto. Se vi volas, vi povas krei kaj disdoni kuponojn por senpaga sendo kaj elekti tiun postulon el listo. Vi ankaŭ povas elekti kombinon de minimuma kvanto por mendo kaj/aŭ kupono.

Notu, ke je aldono de sendmetodo *Senpaga sendo* al sendozono **kaj** elekto de *N/A* (Ne Aplikebla) el la listo de postuloj, senpaga sendo estos opcio por ĉiu kliento en tiu sendozono!

Eble vi volas doni senpagan sendon por kelkaj elektitaj varoj, aldone al viaj agordoj de la supra sendmetodo *Senpaga sendo* de WooCommerce.

Vi povas simple aldoni sendokategorion *Senpaga* kaj apliki ĝin al dezirataj varoj. En sendometodo plenigu la kosto-kampon de tiu sendkategorio. Sed kiam kliento aĉetas *nur* tiun unu varon, tiu kliento vidos la nomon de tiu sendmetodo. La nomo de tiu sendmetodo sendube ne estos *Senpaga*.

Estas pli bone ŝanĝi la nomon de la sendmetodo de '*Fiksa Tarifo*' al '*Tarifo*'. Ĝi tute ne estas *fiksa*.

Vi eble volas esplori la modulon de *Booster* por WooCommerce *Sendometodoj laŭ varoj*, kaj kelkajn aliajn modulojn de *Booster* en *Sendo k. Mendoj*. Kompreneble, *Booster* por WooCommerce

devas esti instalita kaj aktiva.

Mi ankoraŭ ne testis ĉiujn ilin, por vidi ĉu ili estas fidindaj, ĉu ne. Sed la opcio kaŝi aliajn sendometodojn kiam senpaga sendo estas aplikebla al tiu mendo ja funkcias, akorde kun la sendmetodo *Senpaga sendo* de WooCommerce, rilate minimuman elspezon. En la agordoj de Booster, ĝi estas en *Sendo k. Mendoj* → *Opcioj de sendo*.

Zorge testu ĉiujn sendmetodojn sub ĉiuj eblaj kondiĉoj.

Loka preno

Loka preno estas kiam kliento loĝas proksime kaj vi volas permesi, ke kliento povu veni por preni la aĉetaĵon. Aŭ eble vi volas oferti liveron al la proksimuloj. Tiaokaze, ŝanĝu la nomon de tiu sendmetodo. Eble al *Loka livero*.

Fine, la defaŭlta sendmetodo (jam markita) vidita de kliento estas tiu plej supra en via listo de sendmetodoj de la sendozono kiu kongruas kun la loko de tiu kliento. Do, trenu kaj faligu la sendmetodon kiun vi deziras esti defaŭlte markita al la supro de la listo en ĉiu sendozono.

Iru trinki vian plej ŝatatan trinkaĵon kaj ripozu. Tio estis streĉa!

Sendmetodoj de ekspedaj servoj

Kiel eblas, ke la kerno de WooCommerce ne donas manieron presadi adresetikadojn??

Nu, se vi uzas PayPal, vi povas elekti sendi sendajn detalojn al PayPal por la preso de sendetikadoj. Multaj homoj uzas iun poŝton aŭ ekspedan servon kaj volas presi aŭ presigi etikadojn rekte de tiu servo. Kopii/algli la adresojn el mendoj de WooCommerce, tamen, estas ĝena.

Eble vi uzas ekspedan servon kaj vi volas, ke tiu estu opcio por kliento videbla ĉe la korbo kaj/aŭ vi volas kunigi presadon de adresetikadoj kun WooCommerce. Vi volas sendi pakaĵojn tutmonde, ankaŭ.

Ekzistas multaj etendaĵoj de WooCommerce (*WooCommerce* → *Etendaĵoj* → *Shipping*) kaj multaj eksteraj programoj de sendmetodoj por WooCommerce.

Interesa ekstera kromprogramo estas [Postmen](#). Ĝi ne estas preparita por tradukado.

Ĉu vi uzas DHL? DHL ja havas oficialan kromprogramon por WooCommerce:

<https://wordpress.org/plugins/dhl-for-woocommerce/>.

[Paĝo de detaloj](#). Ĝi ne estas preparita por tradukado.

Eble vi volas presi viajn proprajn adresetikadojn por viaj sendmetodoj de WooCommerce, rekte de via administrado de WooCommerce. Ekzistas tiu ĉi kromprogramo:

<https://wordpress.org/plugins/shipping-labels-for-woo/>. Ĝi ne estas preparita por tradukado.

Por peti tradukan dosieron, ni bezonas ricevi peton de iu uzanto de la esperantigita WooCommerce.

Koncizkodoj

Koncizkodoj estas tre povodonaj iloj! Koncizkodo aspektas kiel: [funkcio opcio=" "]. Ĝi estas

maniero permesi al administranto de WordPress enmeti kodon sen la kono de kodo! Aparte povodona el ĉiuj koncizkodoj de WooCommerce estas [products]. Vidu ekzemplojn sub la opcioj.

Products

(Varoj). Vi devas uzi la anglan ene de la koncizkodoj. :(

Sed en iu ajn paĝo, afiŝo aŭ tekstokampo kiu permesas aldonon de koncizkodo, vi povas enmeti viajn elektojn. La elektoj de la koncizkodo `products` estas:

Montraj opcioj de varoj

- `Limit` – nombro da varoj por montri. La defaŭlto estas 12 por varoj kaj -1 por kategorioj (ĉiuj).
- `Columns` – nombro da kolumnoj por montri. La defaŭlto estas 4.
- `Orderby` – ordigo de varoj. Vi povas uzi pli ol unu manieron ordigi, per meto de spaceto inter opcioj. La ordigaj manieroj estas:
 - `Date` – dato de publikigo de varo.
 - `Id` – ID de varo.
 - `Menu_order` – la menu-ordo, se vi fiksis tion (plej malaltaj aperas unue).
 - `Popularity` – nombro da vendoj.
 - `Rand` – hazarda montrado ĉe ĉiu paĝo-ŝarĝo (se vi uzas kaŝmemoron, eble ne funkcios).
 - `Rating` – averaĝa pritakso.
 - `Title` – titolo de varo. Tio estas la defaŭlta ordigado.
- `Skus` – SKUoj. Apartigu SKUojn per komoj.
- `Category` – kategorioj. Apartigu urlnomojn de kategorioj per komoj.
- `Order` – vi povas kreskigi la ordon (ASC) aŭ malkreskigi la ordon (DESC). La defaŭlto estas kreska ASC.
- `Class` – aldonas klason por propra CSS por doni al la aspekto.
- `On_sale` – por montri varojn je rabatprezo. *Ne uzu kune kun `best_selling` (plej vendataj) aŭ `top_rated` (plej alte taksataj)*, pro konflikto. Devas esti true (jes). *Ne uzu kun la subaj enhavaj opcioj de varoj.*
- `Best_selling` – por montri la plej vendatajn varojn. *Ne uzu kun `on_sale` aŭ `top_rated`.* Devas esti true (jes). *Ne uzu kun la subaj enhavaj opcioj de varoj.*
- `Top_rated` – por montri la plej alte taksitajn varojn. *Ne uzu kun `on_sale` aŭ `best_selling`.*

Enhavaj opcioj de la varoj

- `Attribute` – atributoj de varoj. Uzu la urlnomojn de la atributoj.
- `Terms` – terminoj de atributoj, apartigitaj per komoj.
- `Terms_operator` – uzeblaj operacioj por komparo de terminoj de atributoj. Ili estas:
 - `AND` – montras varojn de ĉiuj elektitaj atributoj.
 - `IN` – montras varojn de la elektita atributo. Tio estas la defaŭlto de la atributo.
 - `NOT IN` – montras varojn **ne** de la elektitaj atributoj.
- `Visibility` – montras varojn depende de videbleco. La opcioj estas:
 - `Visible` – varoj videblaj en la vendejo kaj en serĉrezultoj. Tio estas la defaŭlto.

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

- **Catalog** – varoj videblaj nur en la vendejo, **ne** en serĉrezultoj.
- **Search** – varoj videblaj nur en serĉrezultoj, sed **ne** en la vendejo.
- **Hidden** – varoj kaŝitaj de kaj la vendejo kaj la serĉrezultoj, ili estas alireblaj nur de rekta URL.
- **Featured** – montras varojn kiujn vi markis Elstarigitaj.
- **Category** – montras varojn en la kategorio specifita. Uzu la urlnomon de kategorio.
- **Cat_operator** – uzeblaj operacioj por komparo de kategoriaj terminoj. Ili estas:
 - **AND** – montras varojn en ĉiuj elektitaj kategorioj.
 - **IN** – montras varojn en elektita kategorio. Tio estas la defaŭlto.
 - **NOT IN** – montras varojn **ne** en elektita kategorio.
- **Ids** – montras varojn de la entajpitaj IDoj. Apartigu ilin per komoj.
- **Skus** – montras varojn de la entajpitaj SKUoj. Apartigu ilin per komoj.

Ekzemple, vi volas montri ĉiujn varojn je rabatprezo. Sed vi ne volas uzi kromprogrameton (spite, ke vi povas uzi kromprogrameton ĉe la supro, ĉe la piedo, ĉe la flanko). Vi volas paĝon kaj vi volas ĝin en la menuo! Bone, vi povas uzi la koncizkodon `[products on_sale="true"]` por montri ĉiujn varojn je rabatprezo. Post meto de tiu koncizkodo en nova paĝo de WordPress, vi povas meti tiun novan paĝon en menuon. Se ne plaĉas la aranĝo de varoj, provu enmeti kolumnojn `[products columns="2" on_sale="true"]`.

Eble vi volas montri librojn de Zamenhof ene de la paĝo Bonvenon:

`[products attribute="autoro" terms="zamenhof"]` Notu la uzon de urlnomo por la nomo de la atributo (por urlnomoj, ne uzu ĉapelitajn literojn). Tio estos longa bonvena paĝo, cetere.

Eble nur poeziaĵojn de Zamenhof: `[products attribute="autoro" terms="zamenhof" category="poezio"]`. Kompreneble, liaj poeziaĵoj devas esti en tiu kategorio kaj la atributo kaj termino jam asignitaj.

add_to_cart

(Aldoni al korbo)

Eble vi blogas pri via nova varo kaj vi volas, ke legantoj povu aldoni tiun varon al la korbo dum ili legas la blogeron! Jen:

`[add_to_cart id="99"]` Uzu la IDon de via varo. Eble vi volos aldoni: `style=""`:
`[add_to_cart id="99" style=""]`

(Alternative, simple aldonu la varon al via blogero: `[products ids="99"]`.)

Legu ankaŭ pri eblo alkroĉi la 'Aldoni al korbo' al URL.

Se vi ne vidas mesaĝojn de WooCommerce kiam vi uzas la koncizkodon Aldoni al korbo, uzu la sekvan koncizkodon kune:

`[shop_messages]`

Tiu aldonos la vendo-mesaĝojn.

Kategorioj

`[product_category]` – montras specifitan kategorion.

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

[`product_categories`] – montras ĉiujn kategoriojn.

Tiu lasta rapide montras ĉiujn kategoriojn en unu paĝo.

Unuopa paĝo de varo

[`product_page id="99"`] – montras la varo-paĝon. Trovas la varon per ID.

[`product_page sku="FOO"`] – montras la varo-paĝon. Trovas la varon per SKU.

Rilataj varoj

[`related_products limit="12"`] – montras rilatajn varojn de montrata varo. Tiu koncizkodo havas la jenajn opciojn:

`limit`

`Orderby`

`columns`

[Fonto](#)

Kelkaj koncizkodoj de Booster por WooCommerce

`wcj_input_field` – alklaku por vidi uzon kaj opciojn.

[`wcj_get_left_to_free_shipping content=""`] – se vi uzas la modulon de Booster, *Restanta ĝis senpaga sendo*, vi eble volus aldoni mesaĝon en paĝo, se vi ne volas uzi la kromprogrameton *Restanta ĝis senpaga sendo*. Ekzemple, eble vi volas entajpi mesaĝon en la supro de la korbo-paĝo, por allogi klientojn aĉeti ĝis la atingo de senpaga sendo. Vi povas simple tajpi: **La minimuma sumo de aĉetoj ĝis senpaga sendo estas: €50** (laŭplaĉe). Sed se vi intencas ŝanĝi la minimumon de tempo al tempo, enmeto de koncizkodo

[`wcj_get_left_to_free_shipping content="%free_shipping_min_amount %"`] ĉiam uzos la ĝisdatan minimumon.

Uzo de koncizkodo [`wcj_get_left_to_free_shipping content="%left_to_free %"`] montros la kvanton restantan ĝis tiu aparta vizitanto ricevos senpagan sendon.

Utilaj trukoj

Aldoni al korbo per URL

Por krei URLon por aldono de aparta varo al korbo, uzu la IDon de la varo post la egalsigno:

<https://viavendejo.com/korbo/?add-to-cart=757>

Notu: se via urlnomo al la korbopaĝo ne estas nomita 'korbo', ŝanĝu la vorton 'korbo' en la URL al la nomo de via korbopaĝo.

Aŭ! Se vi *ne* volas, ke iu iru al la korbopaĝo: <https://viavendejo.com/?add-to-cart=757>. Tiaokaze, la alklakinto vidos la ĉefpaĝon kun aldona mesaĝo “Nomo de varo aldoniĝis al via korbo”. “Vidi korbon →”.

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

Se vi volas direkti al la pagprocezo: <https://viavendejo.com/finvendo/?add-to-cart=757>. Uzu la urlnomon/finadreson de via pagproceza paĝo.

Do, nun vi povas aldoni tiun URLon al retmesaĝoj pri la varo, ktp.

Notu: vi devas marki la skatolon ĉe *WooCommerce* → *Agordoj* → *Varoj* → *Aldoni al konduto de korbo* → *Enŝalti butonojn povigitajn de AJAX por aldoni al korbo en arkivoj*.

RSS-Fluo

Se vi havas alian retejon aŭ povas konvinki iun montri fluon de via vendejo, jen la retadreso de varo-fluo: <https://miaretejo.com/vendejo/feed>. Se tiu adreso ne funkcias, vi devos rigardi la fonton de via vendeja paĝo kaj serĉu **Varoj Distribuo**. (Pardonon, sed mi ne povas traduki pli taŭge ol tio.) Rimarku tiun adreson.

Nun, vi havas la adreson de la fluo. En WordPress-ejo, vi povas uzi la kromprogrameton **RSS** por montri liston de varoj en tiu retejo. Ankaŭ, tiu fluo helpas sekvantojn de viaj varoj.

Restarigo de statoj

Por restarigi defaŭltojn de WooCommerce, viŝi statojn kaj seancojn kaj fari aliajn utilaĵojn, iru al *WooCommerce* → *Stato (de Sistemo)* → *Iloj*.



Propra traduko

Booster por WooCommerce donas multajn opciojn por ŝanĝoj al etiketoj kaj butono-tekstoj. Sed se vi volas pli profunde ŝanĝi la tradukon de WooCommerce, vi povas:

1. uzi kromprogramon kiel [Loco Translate](#)
2. eksporti la tradukan dosieron per alklako al: [Export](#), malfermi tiun dosieron en simpla tekst-redaktilo aŭ en [PoEdit](#), fari la ŝanĝojn. Se vi uzas simplan tekstoredaktilon, vi devas ŝanĝi ĉe linioj komenciĝantaj per `msgstr`. Tenu la citilojn ĉirkaŭ la frazo.

Konservu viajn ŝanĝojn. Je konservo, PoEdit kreas dosiertipon `.MO`, kiun vi bezonos alŝuti al la servilo. Se vi uzas simplan redaktilon, iru al <https://po2mo.net/> por senpage konverti la dosieron `.po` al `.mo`.

Alŝutu la rezultan `.mo`-dosieron al la servilo kiu servas vian vendejon al la interreto. Vi devas meti ĝin en la loko `wp-content/languages/woocommerce/woocommerce-eo.mo`. Verŝajne, la dosierujo 'woocommerce' ene de 'languages' ne ekzistas. Vi devos krei ĝin. Post tio, vi havos propran tradukon de WooCommerce por via vendejo. En tiu protektata loko, la ĝisdatigoj de la oficiala traduko ne anstataŭigos ĝin.



Sauĉo

Sauĉo estas por homoj kiuj estas komfortaj pri la aldono de programa kodo al WordPress.

Ĉiam kreu sekurkopion de la dosiero *functions.php* antaŭ ol vi faros ŝanĝojn al ĝi. Okaze se via ŝanĝo fuŝas aferojn, vi povos rapide restarigi vian malnovan *functions.php*.

Notu, ke se vi uzas idan etoson, la dosiero *functions.php* de via ida etoso ne anstataŭigas tiun de la patra etoso. WordPress **aldonas** la funkciojn en la *functions.php* de la ida etoso al la funkcioj de la patra etoso.

Certiĝu, ke via dosiero *functions.php* havas kiel la unuan linion:

```
<?php
```

Se vi **ne** uzas idan etoson, sed faras ŝanĝojn rekte al etoso, la sekva ĝisdatigo de tiu etoso forviŝos viajn ŝanĝojn. Legu la saŭcon pri idaj etosoj sube de la aliaj sekcioj.

Senda asekuro

Jen, peco de kodo permesanta nedevigan aldonon de senda asekuro al aĉeto. Ĝi estu aldonita al la dosiero *functions.php* de via uzata etoso (espereble vi kreis idan etoson). Vi devas krei novan varon 'Senda asekuro', donu al ĝi la valoron de la kosto de asekuro. En 'Videbleco en katalogo' kaŝu ĝin. Post kreo de tiu nova varo, notu la ID. En la kodo, trovu `$product_id = 669`. Ŝanĝu la okazojn de 669 al la ID de via varo Senda Asekuro. Nun, ŝanĝu la okazojn de \$3 al la valoro de via varo Senda Asekuro.

```
add_action('woocommerce_cart_totals_after_shipping', 'wc_shipping_insurance_note_after_cart');
function wc_shipping_insurance_note_after_cart() {
global $woocommerce;
$product_id = 669;
foreach ( $woocommerce->cart->get_cart() as $cart_item_key => $values ) {
    $product = $values['data'];
    if ( $product->id == $product_id )
        $found = true;
    }
    // if product not found, add it
if ( ! $found ):
?>
    <tr class="shipping">
        <th><?php _e( 'Senda asekuro', 'woocommerce' ); ?></th>
        <td><a href="<?php echo do_shortcode(['add_to_cart_url id="669"]); ?>"><?php _e( 'Aldoni
sendan asekuron (+$3)' ); ?> </a></td>
    </tr>
<?php else: ?>
    <tr class="shipping">
        <th><?php _e( 'Senda asekuro', 'woocommerce' ); ?></th>
        <td>$3</td>
    </tr>
<?php endif;
}
```

[Fonto](#) al vera [Fonto](#)

Salutilo en menuo

La menuaj opcioj de WooCommerce donas la paĝon Mia Konto kaj la opcion aldoni menueron 'Elsaluti', videbla nur al ensalutintaj uzantoj. Tio sufiĉas. Sed se vi suspektas ke uzantoj ne komprenas ke la paĝo Mia Konto estas la loko por iri por ensaluti aŭ registriĝi, vi povas aldoni la jenan kodon al la dosiero *functions.php* de via etoso kaj ĝi aldonos salutilon rekte al via ĉefa menuo. La salutilo ŝanĝos staton – se la uzanto estas ensalutinta, la menuero montros 'Elsaluti'. Se la uzanto

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

estas elsalutinta, la menuero montros 'Ensaluti':

```
/**
 * Aldono de salutilo al cxefa menuo.
 */
add_filter( 'wp_nav_menu_items', 'aldoni_salutilon', 10, 2 );

function aldoni_salutilon( $items, $args ) {

    if ( is_user_logged_in() && $args->theme_location == 'primary' ) {

        $items .= '<li><a href="'. wp_logout_url( get_permalink( woocommerce_get_page_id( 'myaccount' ) ) ) .'">Ensaluti</a></li>';

    }

    elseif (!is_user_logged_in() && $args->theme_location == 'primary' ) {

        $items .= '<li><a href="'. get_permalink( woocommerce_get_page_id( 'myaccount' ) ) .'">Ensaluti</a></li>';

    }

    return $items;

}
```

[Fonto](#) kaj [Fonto](#)

Forigo de agnosko pri Storefront

Se vi uzas la etoson Storefront, sed ne plaĉas al vi la agnosko pri Storefront en la piedo, vi volas propran tekston; metu la sekvan kodon en la dosieron *functions.php* de ida etoso.

```
function storefront_credit () {
?>
    <div class="site-info">
        <?php echo 'Enskribu tekston tie Ĉi';?>
    </div><!-- .site-info -->
<?php
}
```

Ida etoso de Storefront

Ĉu vi volas krei kaj konservi viajn proprajn ŝanĝojn al la etoso Storefront?

Kutime por WordPress, vi devas aldoni pecon da kodo al la dosiero *functions.php* por envicigi la stil-dosieron de la patra etoso. Tamen, vi ne bezonas aldoni tiun kodon se vi kreas idon de Storefront. Storefront faras tion.

Kreu novan simplan tekstan (plat-tekstan) dosieron. Nomu ĝin *style.css*.

En la dosieron *style.css* vi bezonas aldoni nur:

```
/*
Theme Name: Storefront Child
Version: 1.0
```

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

```
Description: Child theme for Storefront.  
Author: Woo  
Author URI: http://woocommerce.com  
Template: storefront  
*/
```

kun ŝanĝo de la nomo post 'Theme Name:' al la nomo de via nova etoso, se vi volas. Tre gravas, ke la linio 'Template:' enhavu *storefront*. Tio estas la nomo de la patra etoso. WordPress uzos la patran etoson por ĉiuj funkcioj kaj stiloj kiujn vi ne havas en via ido.

Kreu ankaŭ simplan tekstan dosieron *functions.php*. Por ido de Storefront, ĝi povas esti malplena! Tamen, enmetu: `<?php` en la unua linio. Certiĝu, ke ĝi estas la sola linio en la dokumento, ĝis vi enmetos kodon. Tio estas nur por sciigi al sistemo, ke iu posta funkcio estas PHP-kodo.

Kreu dosierujon sub `wp-content/themes`. Nomu la sub-dosierujon same kiel vi nomis vian idan etoson, sed se vi uzas pli ol unu vorton por la nomo, uzu streketojn inter ĉiuj vortoj. Eble `wp-content/themes/storefront-child`.

Enmetu viajn ĵus kreitajn dosierojn *style.css* kaj *functions.php*.

Iru al *Aspekto* → *Etosoj* por aktivigi vian novan etoson.

Kompreneble, kiam vi aldonas funkciojn, vi volas aldoni ilin al via nova *functions.php* de la ida etoso.

Kaj kiam vi ŝanĝas ion al la stilo, vi povas aldoni tiun ŝanĝon en *style.css* de via ido.

Se ĝenas vian fieron, ke estas neniu bildo por via ida etoso en la administra loko por etosoj, kaptu ekrankopion de via vendejo, stucu ĝin al 1200 x 900 bilderoj, proksimume, kaj metu tiun en la dosierujon de via ida etoso, kun la nomo *screenshot.png*).

Alia ida etoso

Diferencoj inter kreo de ida etoso de iu alia patra etoso kaj ido de Storefront:

Se vi volas krei idan etoson de iu alia etoso, vi devos enmeti envicigan kodon al la dosiero *functions.php* de la nova ida etoso:

```
<?php  
function my_theme_enqueue_styles() {  
  
    $parent_style = 'patra-style'; // Tio estas 'twentyseventeen-style' por la etoso Twenty.  
    Seventeen.  
    wp_enqueue_style( $parent_style, get_template_directory_uri() . '/style.css' );  
    wp_enqueue_style( 'child-style',  
        get_stylesheet_directory_uri() . '/style.css',  
        array( $parent_style ),  
        wp_get_theme()->get('Version')  
    );  
}  
add_action( 'wp_enqueue_scripts', 'my_theme_enqueue_styles' );  
?>
```


Ĉu vi vidas la parton `$parent_style = 'patra-style'; ? 'patra-style'` vi devas anstataŭigi per la patra stilo. Se vi uzas la etoson Twenty Seventeen, vi devas anstataŭigi `'patra-style'` per `'twentyseventeen-style'`.

Malfermu la dosieron `functions.php` de la dezirata patra etoso kaj tralegu por la linio:

```
wp_enqueue_style( 'style', get_stylesheet_uri() );
```

La vorto tie: (`'style'` , estas la vorto kiun vi devas uzi.

Jen, vi povas enmeti ĝin. Unu tameno: se tiu etoso havas plurajn stilfoliojn, vi devos envicigi ilin ankaŭ.

Por la stilfolio `style.css`, ŝanĝu la vorton post 'Template:' al la *dosieruja* nomo de via patra etoso. Gravas, ke vi uzu la nomon de la etoso laŭ la nomo de la dosierujo de tiu etoso, en `wp-content/themes/`. Ne uzu la montro-nomon de la etoso. Ekzemple, ni diru, ke vi volas uzi la patran etoson Blankaj Nuboj. Iru rigardi al la dosieruja nomo, kiu eble estas blankajnuboj. Uzu *blankajnuboj* en la linio Template:.

Ida etoso de Twentyseventeen

La ĉefpaĝo de Twentyseventeen estas trafa, ĉu ne, kun la filmo kiel kapo, kun la malsamaj sekcioj, ĉiu sekcio kun elstarigita bildo kiu rulumas? La sekcioj estas apartaj paĝoj. Tio donas al vi eblon aranĝi ilin aparte. Ne forgesu enmeti elstarigitan bildon.

Ĝi estas bonega etoso por WooCommerce. Se vi volas ŝanĝi la nombron da sekcioj en la ĉefpaĝo, vi povas enmeti la sekvan kodon en vian dosieron `functions.php` de via ido:

```
add_filter( 'twentyseventeen_front_page_sections', 'prefix_custom_front_page_sections' );  
  
function prefix_custom_front_page_sections( $num_sections )  
{  
    return 6;  
}
```

Tio enmetos 6 sekciojn anstataŭ 4. Kompreneble, ŝanĝu tiun 6 en la kodo laŭplaĉe. [Fonto](#)

Tiparoj de Google

Se vi volas lige uzi tiparon de Google, vi povas trovi deziratan tiparon ĉe <https://fonts.google.com/> kaj enmeti la nomon de tiu tiparo **anstataŭe** de la vorto *Lato* en la suba kodo. *Lato* ne enhavas la ĉapelitajn literojn.

Ankaŭ, se vi volas uzi malsamajn pezojn de la tiparo, ol 400, 700, 400i, faru. *i* = *kursiva* (vidu 400i). Se vi volas uzi grasan tiparon, *b* = *grasa*, ankaŭ la pezo 700 = *grasa*. La pezo 400 estas pli normala pezo.

Nun, vi pretas meti tiun kodon en la dosieron `functions.php` de via ida etoso:

```
function custom_add_google_fonts() {  
    wp_enqueue_style( 'custom-google-fonts', 'https://fonts.googleapis.com/css?  
family=Lato:400,700,400i', false );  
}
```

Prilaborita en 2018-04-05 (aldono de pluraj filtriloj, pluraj tiparoj)

```
add_action( 'wp_enqueue_scripts', 'custom_add_google_fonts' );
```

La sekva paŝo estas iri al la dosiero *style.css* kaj enmeti la nomon de la tiparo. Ekzemple, se vi uzas la *style.css* de Boutique por komenci vian propran idon, vi povas anstataŭigi la vorton *Lato* per via dezirata.

Notu, ke Boutique uzas du tiparojn de Google, *Lato* kaj *Playfair Display*. Playfair Display ja havas la ĉapelitajn literojn. Notu, ke nomo de tiparo kun du vortoj devus esti metita en la supran kodon kun plus-signo inter la vortoj, kiel: Playfair+Display.

Se vi volas preni du tiparojn de Google, metu vertikalan strion inter la nomoj.

Se vi ne volas ligi al google.com por 'pruntepreni' tiparon, vi povas anstataŭigi la vorton *Lato* en *style.css* per nomo de tiparo en ĝenerala uzo en via lando.



Montrofenestro

Kelkaj retbutikoj kiuj uzas WooCommerce:

- [Bookriot.com](#) (etoso nectar2017)
- [Clickbank](#) (ida etoso de X)
- [The Spectator](#) (etoso ShopWired?)
- [Wakami](#) (etoso Flatsome)

Vi povas uzi la kontakto-formularon ĉe eo.wordpress.org por fari peton, demandon, sugeston aŭ kritikon. La formularo troviĝas sub la unua sekcio en tiu paĝo.